



**Esperanto  
Societo  
Frankfurto**



# Esperanto-Informilo

**Februaro**

**2024**

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Rakonto
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

**Kolofono:**

Redaktoro teamo:  
Georg Hennemann  
Ulrich Fellmann  
Korektanto:




Foto: Statistiko pri la „plej facilaj lingvoj lerneblaj“ trovita en interreto, aŭtoro nekonata

Mezaĝo de la prezidanto:

Mi esperas ke ĉiuj niaj legantoj startis feliĉe en la ankoraŭ freŝan jaron 2024 kaj ke vi sukcese povas realizi viajn nunajn planojn, promesojn, revojn ktp.

En tiu moderna interreta epoko ĉio ja iel interrilatas kaj ne ekzistas simplaj respondoj al multaj aktualaj problemoj. Malproksimeco ja kvazaŭ ne plu ekzistas en tiu interkonektita moderna mondo kaj ekstremaj partioj de ambaŭ flankoj provas misuzi nian necertecon kaj oni devas ĉiam atenti ne fali en iliajn kaptilojn. La lingvo Esperanto estas bona ilo por sciigi informojn kaj opiniojn el diversaj fontoj kaj prijuĝi aspektojn de diversaj flankoj, ĉu temas pri politikaj, ekonomiaj, religiaj, natursciencaj aŭ sociaj temoj. Mi deziras al vi bonan legadon

*Georg Hennemann, 01.02.2024*

**Esperanto-Gesellschaft  
Frankfurt am Main e.V.**  
[www.esperanto-frankfurt.de](http://www.esperanto-frankfurt.de)  
Vorsitzender:  
Georg Hennemann  
Rehgartenstr. 16  
35683 Dillenburg  
Tel. 02771-8196614

**Bankverbindung:**

Esperanto-Gesellschaft F.a.M  
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01  
BIC: DRESDEFFXXX  
bei: Commerzbank Frankfurt

**Jahresbeitrag**

ESF+DEB-Beitrag: 96 €  
Familienmitglied: 48 €  
Nur ESF: 24 €  
Familienmitglied: 12 €

# Programo

## **“Unua mardo”**

la 6-an de februaro 24

ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zumo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

## **“Tria mardo”**

surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt

Dienstag, den 20. Februar, 24

Mardon, la 20-an de februaro, 24

18:30 h      Sprachrunde

Babila Rondo

19:30 h      Vortrag

Prelego

"Über CERV - Programm „Bürger, Gleichheit, Rechte und Werte.“

"Pri CERV- Programo Civitanoj, Egaleco, Rajtoj kaj Valoroj.”

G. Hennemann

## **“Kvara mardo”**

la 27-an de februaro, 24

ekde la 19h horo: Senprograma samideana babila renkontiĝo

Stattcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt/Main

# El la klubo

---

## Anoncoj:

- ✚ 13.2.24 Estrarkunveno per ZOOM, 19h
  
- ✚ 16.4.24 Membrokunveno la trian mardon de aprilo
- ✚ 25.5.24 Propono: Somerfesto je G. Schäfer en Stierstadt
- ✚ 29.6.24 Propono: Ekskurso al „Vulkanurbo“ Gedern en Vogelsberg-Distrikto
- ✚ Septembro Propono: Migrado kaj jubilea evento en la Naturamika dometo  
“Brombacherhütte Lärchenweg, 61389 Schmitten-Brombach”  
<https://naturfreundejugend-ffm.de/unsere-haeuser/>
  
- ✚ 5.8. – 15.8.24 Someraj ferioj de Saalbau-MÜZ

## Eventoj en la Rejn-Mejn-Regiono:

- ✚ 15.04.24 – 19.04.24 *Esperanto-Semajno en VHS Sonnemannstraße, Frankfurt de Martin Ptasinski, pliaj informoj:*  
<https://vhs.frankfurt.de/de/portal#/search/detail/167920>

# Rakonto „Advento en la altmontaro“

Tradukprojekto de G. Hennemann

„Advento en la altmontaro“ de Gunnar Gunnarsson (1889 -1975) estas 82 paĝa rakonto originale verkita en la dana lingvo. La rakonto temas pri islanda paŝtisto kaj liaj ŝafoj en la antaŭkristnaska tempo, tradikita al la germana de Helmut de Boot. Gunnar Gunnarsson estis konsiderita por la Nobel-premio pri literaturo en 1918, 1921, 1922, 1955, 1960, 1961 kun 1955 la jaro kiam li havis la plej multajn nomumojn.

Kiam festo anonciĝas, la homoj ekpreparas sin, ĉiu laŭ sia propra bontrovo. Ekzistas ja kelkaj manieroj. Ankaŭ Benedikto havis sian propran. Ĝi konsistas el tio, ke komence de la kristnaska tempo, kiam la vetero ĝin permesis, do eble jam la unuan adventan dimanĉon, li ekpakis kaj metis en dorsosakon provianton, strumpojn por ŝanĝi, kelkajn parojn de novaj ledŝuoj kaj petrolan kuirilon, aldonis kruĉon da petrolo kaj boteleton da keroseno kaj tiam li ekiris al la alta montaro, kie en tiu vintra sezono nur duraj rabobirdoj, vulpoj kaj ununuraj devojiĝitaj ŝafoj vagadas.

Kaj precipe tiujn ŝafojn li celis, bestojn, kiuj dum la regularaj aŭtumaj kolektadoj ne estis trovitaj. Ili ĉi tie ne devus morti pro frosto aŭ malsato, nur pro tio, ke neniu klopodis aŭ aŭdacis ilin serĉi kaj hejmen irigi. Ankaŭ ili ja estis vivantaj estaĵoj. Kaj li sentis ian respondecon por ili. Lia celo do estis tute simpla, ek trovi kaj sendifekte rekonduki ilin al rifuĝejo, antaŭ ol la granda festo solene distribuis sian sanktecon super la mondo, disdonante pacon kaj plaĉon en la koroj de la homoj, kiuj faris sian plejeblon.

Dum tiu sia adventmigrado Benedikto ĉiam estis sola. Aŭ pli bone, sen io homa akompano. Ĉar li ja havis sian hundon kaj plejofte ankaŭ lian gvidvirŝafon apud sin. Lia aktuala hundo nomiĝis Leo kaj estis, kiel Benedikto diris, vera Papo de hundo. La virŝafo vokiĝis pro sia eltenemo je la nomo Knorc. Tiuj tri estis je tiuj ekskursoj jam pluraj jaroj nesebareblaj kaj rilatis unu al la alia tiomgrade en unu profunda konateco, kiu eble nur inter foraj bestospecoj okaziĝas, kie ne ombro de la propra egoo, de propra sango, de propraj deziroj kaj emoj implike kaj obskurante interstaras. Cetere al tiu bando apartenas kvara, la ĉevalo Fakse; nur ĝi bedaŭrinde estis tro etpieda kaj peza por tratroti la profundan, malfirman neĝon de la antaŭvintro, kaj ankaŭ ne tro kapabla tiom multe da lacegaj tagoj elteni kun nur malmulta manĝaĵo, kion la tri aliaj provizore povus. Nur kun dolora aflikto Benedikto kaj Leo forlasis lin, kiam ankaŭ nur por unu semajno. Knorc prenis tiun sorton kiel ĉion alian kun pli granda trankvileco.

... daŭrigota

# Rakonto

---

(de Felmano Ulriko)

La akvo estas malvarma

Hodiaŭ matene mi estis ĉe mia frizisto. Ekstere ni havis du minusajn gradojn, kaj la stratoj, domoj kaj aŭtomobiloj estis parte neĝkovritaj, parte la trotuaroj estis glitaj pro hieraŭ degelita kaj tranokte denove frostita neĝo. Kiam mi enirintis la salonon kaj demetis mian jakon, la frizistino plendis, ke mia jako estas nur somera jako, "tro maldika!", kaj kiam ŝi vidis ke post ties demeto mi surhavis nur t-ĉemizon ŝi diris "ĉu vi ne sentas malvarme!" Homoj ofte demandas min tion, kaj intertempe iĝintis mia kutima respondo diri "mi ja volas ankoraŭ havi la eblon pliigi mian vestaĵon por kiam iĝos vere malvarma!"

Vere, homoj malsame sentas kaj traktas la saman temperaturon, kaj estis jam ofta diskuto inter miaj amikoj, kiujn kvantojn al tiu malsameco kontribuas la faktoroj de genetiko, konduto, trejnado, sporto, sano, mensa sinteno ktp.

Antaŭ pli ol 25 jaroj, kiam mi estis en Suomujo, mi iam vintre eĉ glacibanis en granda arbara lago, ĉirkaŭita de alta neĝo, la precizan aeran temperaturon ni ne sciis, devis esti io inter -5 kaj -15 gradoj Celsiusaj. Mi estis kun internacia grupo kaj sub gvido de du suomoj ni vizitis saŭnokabanon kiel ili en tuta Suomujo troviĝas en la arbaroj, pretaj esti uzotaj fare de ajnaj hazardaj vizitantoj. Iam ni sidis en la varmego, ŝvitantaj kaj vigle rakontantaj, nudaj escepte de la egipto kaj la usonano. Post iom da tempo la suomoj diris: kaj nun ni devas eliri, en la neĝon, kaj salti en la lagon! La bordo de la lago estis nur ĉ. dek metrojn de la kabano.

Neniu de ni nesuomoj ĝis tiam faris tiaĵon, ne eĉ la svedoj, sed mi fidis en la suomoj kaj faris tion. Ekstere mi surprize konstatis ke la eksterkabana minusgrada aero sentiĝis kiel agrabla venteto, mia plenhejtigita korpo sentis neniun malvarmon. Mi imitis la suomojn kaj senzorge faris, kion oni ordinare nepre ne faru, se eĉ la akvo havus 20 gradojn pli ol tiu havis: senprepare mi ĵetis min en la lagon. Kaj eksentis sensacian ĝojon.

Ekde tiam mi nomas tion la relativecteorion de la malvarmo. Kial? Estis ja pliaj spertoj, kiuj gvidis min al

tiu nomado. Ekzemple, averaĝe ŝajnas, ke virinoj iom pli frue fridas ol viroj. Kaj viroj averaĝe pli frue fridas ol mi. Sed eĉ vintre mi foje en la metroo vidas virinojn kun mallongegaj jupoj, sur la kruroj havantaj nur tre maldikajn ŝtrumpantalojn. Mi jam frostas vidanta tion... sed ŝajnas, ke la longa kutimo esti tiel vestita trejnais la gambojn de tiuj virinoj kompensi tion per plia sangofluo aŭ alimaniere.

Ĉiuokaze, tion, kaj kion mi estis faranta en Suomujo, mi ja ne farus en aliaj cirkonstancoj, do, ekzemple, tutkorpe salti en malvarmegan akvon, certe ne sen antaŭa duonhora longa saŭnado en pli ol 90-grada aero. Kontrastante al tiu suomvintra sperto, mi ja povas rakonti pri kvazaŭ inversa sperto okazinta dum somero.

Mi iam estis dum kelkaj monatoj en Polujo por kunlabori en certa tasko en instituto por hidraŭlaj maŝinoj je universitato. Tiam mi loĝis en ĉambro de studenta loĝdomo. La duŝo estis je aparta ĉambreto je la koridoro, komuna al pluraj studentaj ĉambroj. Somere la universitato ne hejtis la akvon por ŝpari energion kaj monon. Do ne disponeblis varma akvo en la duŝejo. Sed estis ja somero, ĉu ne?

La unuan fojon mi trovis la akvon terure malvarma. Mi eĉ dirus: glacie malvarma. Mi povis ĝin elteni nur tre mallonge. Certe, ĝi estis ne tiom malvarma, kvankam ne somerece varma, la akvo venis ja el iom profunda parto de la grundo, tamen, ĝi certe ne havis malpli ol dek gradojn. Eble ĝi eĉ havis 12, aŭ 15? Sed sentiĝis fridega.

Sed iam post iam mi alkiutimiĝis, kaj post kelkaj tagoj mi duŝis min preskaŭ normale, kvankam la akvo restis same malvarma. Mia korpo lernis kompensi la temperaturon. Mi ne sciis tion, se mi ne havintus tiun sperton dum mia tempo en Polujo.


Kaj mi hodiaŭ ankaŭ ne sciis, ke eĉ multe malpli varma vere glacieca akvo ne sentiĝas malvarme, kiam la korpo estas plenŝtopita de varmego pro longa saŭnado. Teorie eble jes, sed ĉu mi vere kredus... kaj estas tute alia afero vere mem sperti tiajn aferojn.

## El la kluba historio

---

El la klublibro volumo [3], kiel malfiksa papero de 2008 plukis por vi G. Hennemann

Kiun tagon celis la parolado? Ĉu lokan aŭ universalan?



## Diversaĵoj

---

**Ŝerco** (trovita de Georg):

Petro: "Sed mi ne volas iri al lernejo!"

Patrino: "Sed vi devas!"

Petro: "Donu al mi du kialojn!" Patrino: "Vi estas 45-jara kaj la lernejestro!"

## Proverbo de la monato (de G. Hennemann)

La kvar proverboj, kiujn mi hodiaŭ prezentas, temas ĉiuj pri malproksimeco kaj la demando, ĉu en nia nuntempa interreta epoko ankoraŭ povas ekzisti iu malproksimo, do ĉu tiuj kvar proverboj ne jam malaktualiĝis:

Temo: Malproksimo

[zam-255.01]	Kion mi ne scias, tion mi ne envias
[zam-255.02]	Se okulo ne vidas, koro ne avidas
[zam-255.03]	For de l' okuloj, for de la koro
[zam-255.04]	Antaŭ okuloj ne staras, doloron ne faras

Fonto: [http://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/zam/teme\\_0255.htm](http://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/zam/teme_0255.htm)

Kiel vi pensas pri tio temo?

## Enigmo (de Felmano Ulriko)

Solve de la enigmo el la januara ei pri la demando: Kiu lando sufiĉe granda ĝis nun mankis, kaj fare de la 11-a aldono nun aperas per eĉ du nomoj, tute malsamaj?

La solvovortoj estis Hindujo kaj Barato. La solvon trovis kaj sendis Bernhard Westerhoff.

## Enigmo nova (de Felmano Ulriko):

La ĉi-tiama enigmo estas kvizo pri nia historio  
Jen la demandoj:

- (1) Kie okazis la unua internacia esperantokongreso, kiu estis la antaŭulo kaj naskoĝermo de la sekvajara oficiale unua kongreso en Bulonjo-sur-maro, kaj kiom de germanaj esperantistoj partoprenis en ĝi?
- (2) Kiu fama franca esperantisto estis instruisto, komunisto, kunfondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kaj redaktoro de la revuoj "Sennaciulo" kaj "Sennacieca Revuo"?
- (3) Kiu konata astronomo en la jaro 1612 kiel unua ekvidis kaj registris la planedon Neptuno, sed erare konsideris ĝin fiksa stelo? (La oficiala malkovro kiel planedo sekvis maljam 234 jarojn poste fare de la germana astronomo Johann Gottfried Galle je la 23-a de septembro 1846.)
- (4) Kiu konata israela ĵurnalisto kaj mondkonata verkisto de 20 libroj, kiu estis ankaŭ lekciisto de literaturo en la Universitato Ben-Gurion de Negevo en Be'er Ŝeba, skribis hebrelingvan novelon nomita "Esperanto", (kuntradukita de Amri Wandel al Esperanto)?

La solvojn sendu al Felmano Ulriko, aŭ en la kluban Telegraman kanalon, aŭ poŝte, aŭ retroŝte al:  
[ulrich.fellmann@gmx.de](mailto:ulrich.fellmann@gmx.de)

# Lasta paĝo

---

## Lingvolernado

Trovu la diferencojn inter la sekvaj kvar nuance diversaj esperantovortoj kaj ligu ilin al la germanlingvaj (aŭ anglalingvaj) vortoj, ekzemple per 1-CE, 2-AD, 3B ktp.

### Esperanto:

- 1 redunda
- 2 superflua
- 3 nenecesa
- 4 senutila

### Germanlingvaĵoj:

- A überflüssig
- B nutzlos
- C unbrauchbar
- D überzählig
- E redundant
- F unnötig
- G unbrauchbar
- H unnütz

### Anglalingvaĵoj:

- a futile
- b superfluous
- c pointless
- d redundant
- e unnecessary

---

Ne forgesu nian virtualan estrarkunsidon

Kiam: la 13-an de februaro '24 ekde la 19-a horo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnlnadnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Ankaŭ eblas partopreni nur per telefono tajpante la lokan frankfurtan numeron:

+49 69 7104 9922

kun Kunveno-ID : 974 9734 9753 kaj Kodo: 811624